

# Dimanĉo, ho unua tag'

(originale verkita)



1. Di - man - ĉo, ho u - nu - a tag',  
Ho tag' de l' ba - za kre - a ag',  
ho tag' de l' mond - es - ti - ĝo!  
ho tag' de l' lum - fa - ri - ĝo!

*refreno:*

Ĉi ti - un ta - gon fa - ris Di'.  
Ga - ji - ĝu, ĝo - ju ni en ĝi,  
kan - tan - te: Ha - le - lu - ja.

2. Sinjora tago, tag' de l' glor',  
ho tag' de l' releviĝo!  
Ho tag' de l' paska rememor',  
ho tago de l' viviĝo!
3. Hodiaŭ ni, la kristanar',  
la tuta eklezio,  
kunvenas por la sankta far'  
de l' Dia liturgio.
4. Kun Kristo, Vorto, Pan' kaj Vin',  
ni iru nun en paco,  
por forte priatesti Lin.  
Kuniros Lia graco.

DIMANĈO, HO UNUA TAG' • M: Peter Sohr 1668, nGL (Speyer) 802 • E  
(originale verkita): Kloster Kirchberg 2014-09-11

Gen 1,3,5 • Psa 118,24